

ENKONDUKO AL EPISODO TRI

INSTRUISTO: Saluton! Kiel vi fartas? Bone, mi esperas. Ĉu vi memoras pri la verbaj finaĵoj **os, -as, -is**? Ekzemple: Mi manĝ**os**. Mi manĝ**as**. Mi manĝ**is**.
En la tria leciono, vi lernos, kiel ordoni al iu fari ion; kiel diri, ĉu io plaĉas aŭ malplaĉas al vi, kaj ĉu io mankas. Sed kio pri Georgo? Kio okazos al li post la embarasa momento en la vendejo? Jes, ja ... vere embarasa momento! Sed ... kio okazos? Nu ... rigardu, aŭskultu kaj ĝuu!

SCENO 1 (BONVOLO-HEJMO)

KARLO Unu du...unu du...unu du...unu du...unu du...unu du.

FILISA Ho ve! Mankas al ni suko! Orang-suko, pom-suko ... ĉu plaĉas al vi pom-suko, Karlo?

KARLO Ho, jes! Plaĉas al mi pom-suko!

HELENA Kaj plaĉas al mi orang-suko!

FILISA Do, bone! Pom-suko, orang-suko! Mankas al ni ankaŭ kafo kaj teo. Teo plaĉas al mi. Ĉu plaĉas al vi teo, Helena?

HELENA Ne! Plaĉas al mi kafo kaj minerala akvo. Plaĉas ankaŭ al paĉjo minerala akvo.

FILISA Ĉu? Georgo! Filozofoj! Georgo!

GEORGO A! He! Kio ... ? Mi pensas! La filozofo pensas!

FILISA Kaj mi parolas ... kaj vi ne respondas. Ĉu plaĉas al vi minerala akvo?

GEORGO Ho, jes! Vi scias ... minerala akvo tre plaĉas al mi.

FILISA Do, bone! Ĉar minerala akvo tre plaĉas al vi ... kaj hodiaŭ vi iros al la familia informejo ...

GEORGO Kio ... ? Ĉu mi ... ? Hodiaŭ ... ?

JOLANDA Paĉjo ... hodiaŭ estas merkredo ...

HELENA Lndon mi laboris tie ... ĉu vi ne memoras?

FILISA Mardon la informejo estis fermita ... ĉu vi ne memoras?

JOLANDA Merkredon -- tie vi laboros. Ĉu vi ne memoras?

FILISA / HELENA / JOLANDA Filozofoj!

FILISA Bone! Nu ... ĉar vi iros al la urbo ... kaj al la informejo ... do ... survoje iru al la vendejoj. Simpla afero, Georgo ... eĉ por filozofoj!

GEORGO Vendejoj ne plaĉas al mi ... tute ne! Ho, Filisa ...

FILISA Silentu, Georgo! Iru! Jen via listo ... prenu! Prenu ... ! Kaj survoje ... iru al s-ino Bundo!

GEORGO Ne, Filisa, ne!

FILISA Silentu, Georgo! Ne estu stulta! Simple iru kaj demandu: Kiel vi fartas, s-ino Bundo? Simpla afero, Georgo ... eĉ por filozofo. Nu ... ek, Georgo! Ek!

SCENO 2 (VENDEJO)

GEORGO Bonan matenon, s-ino Bundo!

FLORA Bonan matenon! Sed diru: Flora! Flora estas bela nomo. Floroj plaĉas al mi. Ĉu floroj plaĉas al vi, Georgo?

GEORGO Jes ... ne! Mi ne scias! Floroj plaĉas al mia edzino, Filisa. Ho ... Ŝi demandis: Kiel vi fartas?

FLORA Bone, Georgo ... dankon! Ĉar dank' al la mono ... dank' al vi ... ho, Georgo

GEORGO Ne! Ne! Mi petas ... ne!

SCENO 3 (BONVOLO-HEJMO)

KARLO Do ... ĝis! Mi kuros ... ĝis!

FILISA Ĝis, Karlo ... ĝis! Kaj kuru bone! Kuru rapide! Kuru fulme! Fulme, mia atleta-filo ... fulme!

KARLO Fulme, unu, du ... fulme, tri, kvar ... fulme, kvin, ses ...

FILISA Nu ... bestoĝardeno ... ĉu bestoĝardenoj plaĉas al vi, Ruselo?

RUSELO Bestoĝardeno? Kio estas: bestoĝardeno? En ĝardeno estas floroj ... sed bestoj? Kio estas besto?

HELENA Ho, Ruselo ... ! Via ŝafo estas besto. Jes ... be-e-e-sto!

FILISA Aŭskultu, Ruselo ... bestoĝardeno estas ejo kun bestoj ... kun elefantoj ... kun tigroj ... kun leonoj.

RUSELO Ho ... ! Ĝi estas ... ejo por elefantoj ... do elefantejo; ejo por tigroj ... do tigrejo; kaj ejo por leonoj ... do leonejo.

HELENA Perfekte, Ruselo! Ho ... vi diligente lernas pri afikso ejo ... kaj diligente lernas pri nia kara lingvo Esperanto! Gratulon!

FILISA Do ... ĉu plaĉas al vi bestoĝardenoj? Ĉu ni iru ... ?

RUSELO Hmmm. Vi estas tre afabla, Filisa ... tre afabla. Sed ne. Bestoĝardenoj ne plaĉas al mi ... kaj certe, pro la leonoj kaj la tigroj, ili ne plaĉas al mia ŝafo.

FILISA Do ... la muzeo. Kio pri la muzeo ... ? La muzeo estas tre interesa.

SCENO 4 (VENDEJO)

FLORA Do prenu, Georgo ... prenu! La lampo estas por vi ... bela, ĉarma lampo el Francio.

GEORGO Ho, Francio ...

FLORA Ĉar dank' al vi ...

GEORGO Ne, ne ... mi ne akceptas! Ho, ve - mi iru ... mi rapidu! Kioma horo estas? Ho, terure! Estas la naŭa dek!

FLORA Ho, ve ... la lampo malplaĉas al vi. Sed ... rigardu! Kia bela korbo! Do prenu, Georgo, prenu! La korbo estas por vi ... bela, ĉarma korbo el Egiptio.

GEORGO Jes, Egiptio.

FLORA Ĉar dank' al vi ...

GEORGO Ne, ne ... mi ne akceptas. Mi iru ... mi rapidu ... ho, kioma horo estas? Ho, terure - estas la naŭa dek unu.

FLORA La korbo malplaĉas al vi - sed rigardu:

GEORGO Ne ... !

SCENO 5 (BONVOLO-HEJMO)

FILISA Do ... la bestoĝardeno ne plaĉas al vi ... la muzeo ne plaĉas al vi ... la vendejoj ne plaĉas al vi.

KARLO Be! Be ... bone mi kuris! Rapide! Fulme ... ! En la parko.

FILISA La parko ... ! Kia bona ideo! Ni iru al la parko!

KARLO Be! Ne iru al la parko! Mi petas ... ne!

HELENA Sed ... ne pluvas ... Certe ne pluvas ... Kaj la suno brilas ... kaj ne fulmotondras. Do ... ne pluvas, la suno brilas, kaj ne fulmotondras ... do ni iru al la parko!

KARLO Ho, ne! La parko ne plaĉos al vi ...

FILISA Stulte! Absurde, Karlo ... !

KARLO Ĝi estas danĝera ... Tre danĝera ejo ... Ekzistas bestoj, sovaĝaj kaj danĝeraj, en la parko ...

RUSELO Ĉu leonoj ... aŭ tigroj ... aŭ elefantoj?

FILISA Ne, ne, Ruselo ... ne en nia parko. Silentu, Karlo! Do ... la parko! Ĉu ni iru?

RUSELO Ho ... mi ne scias ...

HELENA Aŭskultu! Mi scias, kio plaĉos al vi, Ruselo ... ankaŭ al via ŝafo. La artgalerio ... !

RUSELO Artgalerio ... ?

HELENA Jes, jes. En artgalerio estas bildoj, skulptaĵoj ... bildoj simplaj, bildoj abstraktaj ... sed ĉio interesa. Do ĉu ni iru?

RUSELO Jes! Ni iru! En artgalerio ne ekzistas sovaĝaj bestoj ... en artgalerio ekzistas ... Helena!

SCENO 6 (VENDEJO)

GEORGO Jes, jes, ĝi estas ĉarma vazo ...

FLORA Do prenu, Georgo, prenu! Por vi la vazo! Ĉar dank' al vi la vendejo ne estos fermita ...

GEORGO Mi scias ... sed ... terure! Jam la naŭa tridek kvin! Do ... vere, Flora ...

FLORA Do prenu, Georgo! Prenu! Kia plaĉa, ĉarma vazo ... ! Ho, ve! Mia vazo! Rompita! Ve!

SCENO 7 (BONVOLO-HEJMO)

FILISA Perfekte! La artgalerio!

HELENA Sed ve! Mankas al mi mono por la aŭtobuso ...

RUSELO Aŭtobuso! Brrrm! Brrrm!

HELENA Kaj mankas al mi mono por la artgalerio ...

RUSELO Ne gravas! Jen mono ... kvincent steloj ...

KARLO Kvincent steloj ... ? Kaj ŝafisto ... ? Be ... !

FILISA Ne, ne, trankviliĝu, kara Helena ... kaj trankviliĝu, Ruselo! Jen mono ... por la aŭtobuso ... por la artgalerio ... sed kio ... ? Kio estas tio? Ho, ve! Ve!

KARLO Kio estas, panjo?

FILISA Kie estas nia mono? Mil steloj ... mil kvincent steloj ... ho, terure! Katastrofe! Nia mono ... for! For!

SCENO 8 (VENDEJO)

GEORGO Ne! Mi balaas! Mi kulpas pri la rompita vazo!

FLORA Mi balau! Estis mia vazo ... !

GEORGO Ne! Mi balaas! Mi!

FLORA Ho! Jen ideo ... ! Ha! Por vi, Georgo ... vodko! Lampoj kaj korboj kaj ĉio alia malplaĉas al vi ... sed certe vodko ne malplaĉos! Jen! Kaj ... dankon!

GEORGO Vere ...

FLORA Nu, Georgo! Jen via sako! Prenu!

GEORGO A! He! Kio ... ? Mia sako ... ? Sed pri la rompita vazo ... mi pagos! Mi volonte pagos!

FLORA Ne gravas, Georgo! Ne gravas! Nu ... iru! Rapidu! Fulmu!

GEORGO Sed pri la rompita vazo ... mi pagos ... ! Mi volonte pagos!

SCENO 9 (BONVOLO-HEJMO)

FILISA Mi ne komprenas. Hieraŭ la mono estis en la tekruĉo ... mi estas certa.

KARLO Do ... ni serĉu! Ni serĉu ... en la tuta domo!

FILISA Kia bona ideo! Eble la mono estas en la dormoĉambro ... aŭ en la ĝardeno ...

KARLO Silentu! Gravas la afero ... tro gravas por ŝafo. Do ... serĉu!

SCENO 10 (INFORMEJO)

GEORGO Ho! Mi soifas! Terure soifas! Minerala akvo ... kie estas mia minerala akvo ... ? Kia stranga, sovaĝa akvo! Sed ... mi soifas! ... Ho!

SCENO 11 (VENDEJO)

KENĜI Bonan matenon, fraŭlino!

FLORA Bonan matenon! Ho ... ! Vi!

KENĜI Sed ... kio estas tio?

FLORA Ne estas, sinjoro ... estis! Tio estis vazo. Rompita, pro la akcidento. Ne gravas. ... Nu, ho! Kia bela plumo ...

KENĜI Ho, plumo ... ? Ho, ne! Mi estas radio-raportisto. Radio-raportistoj multe parolas ... malmulte kaj malofte skribas.

FLORA Radio-raportisto ... !

KENĜI Esperanta ... en la Esperanto-radio.

FLORA Ĉu ... en Pola Radio ... ?

KENĜI Jes ... Pola Radio, en Varsovio, Pollando ... Ĉina Radio Internacia, en Pekino, Ĉinio ... vere ... Esperanto-radio en la tuta mondo. Mi raportas pri Esperanto kaj pri esperantistoj. Espereble, fraŭlino, mi raportos ankaŭ pri vi.

FLORA Pri mi ... ?

KENĜI Certe ... pri via vendejo ...

FLORA Ho ... nu ...

KENĜI Bone! Nu ... kie ni parolos? Ĉu ĉe vi ... en via vendejo? Aŭ ĉu en mia hotelo? Eble la hotelo estas trankvila ...

FLORA Kio ... ? Vi gastas en hotelo ... ? Sed ... ĉu vi ne estas membro de la esperanta pasporta servo ... pasporto al la tuta mondo?

KENĜI Kompreneble! Sed ...

FLORA Ankaŭ mi estas membro! Do ... vi gastas ĉe mi! Vi estos mia gasto!

KENĜI Ho ... nu ... vere ... mi ne scias ...

FLORA Ho, jes! Ĉio estas en ordo! Mi ĝojas!

KENĜI Nu ... do, volonte! Dankon, fraŭlino! Vi estas tre afabla.

SCENO 12 (BONVOLO-HEJMO)

FILISA Filozofoj! Kie li estas?

RUSELO Silentu, kara ŝafo! Kio estas ... ? Trankviliĝu!

KARLO Serĉu tie ... sur la tablo ... Serĉu tie ... sub la tablo ...

FILISA Kie li estas? Ĉu estis akcidento?

KARLO Serĉu tie ... sur la seĝo ... Serĉu tie ... sub la seĝo ...

FILISA Ĉu li estas malsana? Ĉu li estas en ambulanco ... ?

RUSELO Kio ... ? Kio ... ? Ho, trankviliĝu, kara ŝafo ... trankviliĝu!

FILISA Ho, Georgo!

SCENO 13 (EN LA INFORMEJO)

GEORGO Minerala akvo ... ! Ah, minerala akvo! Ho, jes, sinjorino ... fraŭlino ... Flora! Mi pagos! La filozofo pagos! Do nun ...

SCENO 14 (BONVOLO-HEJMO)

KARLO Be ... mi pensu! Mi pensu! La mono ne estas ĉe ni ... en la domo. Ni serĉis.

RUSELO Karlo ... aŭskultu, mi petas! Mia ŝafo diris ...

KARLO Ŝafo ... ŝafo! Via ŝafo estas stulta besto ... absurda. Silentu! Kaj ne bleku! Mi pensas! Nu! Helena kaj mi serĉis. Ni serĉis sur la tablo ...

HELENA Sub la tablo ...

KARLO Ni serĉis sur la seĝo ...

HELENA Sub la seĝo ...

KARLO Ni serĉis sur la lito ...

HELENA Sub la lito ... kaj vi serĉis sur, sub kaj en la kapkuseno.

FILISA Kaj la mono estas for.

KARLO For ... be! Ĝi estas ŝtelita!

FILISA/HELENA Kio ... ? / Ŝtelita ... !

RUSELO Helpu! La vorto: Ŝtelita ... ? Kio ĝi estas?

HELENA Ho ... terure! Ŝtelisto ŝtelas ... kun granda sako, foriras kun via mono ... kaj via mono estas

KARLO Ŝtelita! Kaj mi telefonos al la polico.

FILISA/HELENA/RUSELO La polico ... ?

RUSELO Aŭskultu, Karlo ... la mono ne estas ŝtelita! Mi scias ...

KARLO Jes ... vi scias! Vi bone scias! Sed mi telefonos al la polico ... kaj la polico juĝos! Silentu! Ne bleku! Ho, jes ... ĉu la policejo ... ? Perfekte ... !

FILISA Ho, Georgo! Filozofoj! Jes, kie li estas ... Filisa, sinjoro detektivo. Mia nomo estas Filisa.

DETEKTIVO Fi- ... literumu, mi petas.

FILISA Fo, i, lo, i, so, a. Filisa.

RUSELO Kia stulta detektivo!

DETEKTIVO Kaj vi, fraŭlino ... via nomo!

HELENA Helena, sinjoro detektivo. Mia nomo estas ...

DETEKTIVO He- ... literumu, mi petas.

HELENA Nu ... ho, e, lo, e, no, a. Helena.

DETEKTIVO Ĉu mo a ... aŭ no a?

RUSELO Kia surda detektivo!

HELENA No a. Helena ... ne Helema.

DETEKTIVO He-le-na. Hmm. Kaj vi, sinjoro ... vi estas ... Ĉarlo Bonvolo.

- KARLO Be! Mi ne estas Ĉarlo ... kun ĉo. Mi estas Karlo ... kun ko. Mi telefonis al la polico ...
- DETEKTIVO Haltu! Literumu, mi petas.
- KARLO Be! Polico: po, o, ...
- DETEKTIVO Ne 'polico' ... idioto! Via nomo!
- KARLO Be! Ko, a, ro, lo, o!
- DETEKTIVO Do ... Ĉarlo!
- RUSELO Kia stulta kaj surda detektivo!
- DETEKTIVO Stulta? Surda? Mi ne estas surda! Sed vi estas (ha, ha!) absurda! Do ... via nomo!
- RUSELO Ruselo. Ro, u ...
- DETEKTIVO Dankon! Mi ne estas idioto ... Ruselo Bonvolo.
- KARLO Be! Li ne estas Bonvolo. Li ne estas membro de nia familio.
- DETEKTIVO Hmmm ... interese! Do ... via familia nomo ... ?
- RUSELO Ŝafisto. Ruselo Ŝafisto. El Nov-Zelando. Kaj jen mia pasporto.
- DETEKTIVO Kia stranga pasporto ...
- RUSELO Ho, ne. Ĝi estas pasporto al la tuta mondo ... Esperanto-pasporto.
- DETEKTIVO Esperanto-pasporto ... tuta mondo! Neeble! Kaj ... kio estas tio?
- RUSELO Kia stulta demando! Ĉu ĝi estas elefanto ... tigro ... ?
- DETEKTIVO Sinjoro ...
- RUSELO Nu ... ŝafo! Kompreneble ... ŝafo!
- DETEKTIVO Kio? Ŝafo? En familia domo? Tio ne plaĉas al mi ... tre! Pasporto ... Ŝafo ...
- KARLO Be! Ne gravas la ŝafo ... gravas la ŝtelita mono!
- DETEKTIVO Kio ... ? Ho, hu ... jes.
- RUSELO Mi scias, kie estas la mono. Aŭskultu, sinjoro detektivo! Ne venis ŝtelisto ...
- KARLO Ho, jes ... venis ŝtelisto! Kaj la ŝtelisto estas en la ĉambro ... kun ni!
- RUSELO/FILISA/HELENA/DETEKTIVO Kio ... ? He ... ? Diru ... !
- KARLO Sinjoro detektivo ... serĉu! Serĉu en la poŝoj de Ruselo!
- RUSELO Kio? En miaj poŝoj? Mi ne komprenas!
- RUSELO Ve! Mi ne estas ŝtelisto! For! For, mi diras ... jen mia mono ... !
- KARLO Jen nia!
- DETEKTIVO Silentu! Ŝtelistoj ne plaĉas al mi! Vi ... ankaŭ la ŝafo ... al la policejo!
- FILISA Ruselo ne estas ŝtelisto ...
- DETEKTIVO Al la policejo ... !
- RUSELO Ne! La ŝafo ne iros. Policejoj ne plaĉas al ŝafoj ... ili ne plaĉas al ŝafistoj. Kaj mi ne estas ŝtelisto ... ne!
- DETEKTIVO Haltu! Revenu!

FILISA Kio ... ! Filozofo mia! Mi serĉos ... mi venos! Georgo ... !

SCENO 15 (INFORMEJO)

GEORGO En la mondon venis nova sento, tra la mondo ...

FILISA Georgo ... ! Ho, ve! Georgo! Ve!